

Alvoko al la svisa esperantistaro por la kreo de Kultura Centro Esperantista
Claude Gacond, 308-a radioprelego, 1969.09.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi monaton estas dissendata en Svislando alvoko, kiu anoncas la kreadon de Kultura Centro Esperantista. Ni pensas vin interesi, legante al vi kelkajn partojn de tiu dokumento, kiun vi povos ricevi, se vi skribas al Radio-Svislando, kurtonda servo, Bern. Tiu alvoko priskribas la nunan situacion de la esperanto-movado.

A.- « **Ni devas nin adapti !** Dum longaj jaroj ni propagandis. Ni dissemis grajnoj en la venton. Hodiaŭ tiuj semoj ĝermis. Ili ekfruktas. Rezulte ni troviĝas en nova situacio. Ni estas semistoj. Ni devas fariĝi rikoltantoj. Ŝanĝiĝis la labor-situacio. Ĝi iĝis pli kompleksa. Ni devas nin adapti al ĝi.

Cl.- **Sub la signo de la diletantismo** : Ĉar neniuj povas sin komplete dediĉi al la poresperanta laboro, niaj agadoj okazas sub la signo de la diletantismo. Hodiaŭ multaj pordoj larĝe malfermiĝas al esperanto, sed ni ne kuraĝas ilin penetri. Kial ? Ĉar tiu penetro signifus por ni respondecojn, kiujn ni ne kapablas plenumi. Pasintjare petoj pri prelegoj restis senrespondaj ; kursoj atendataj ne povis okazi ; lernejoj pretaj enkonduki esperanton ne estis kontaktitaj ; gazetoj emaj raportoj pri nia movado ne estis nutritaj ; societoj, turism-oficejoj, komercistoj pretaj kunlabori vane atendis nian kunlaboron ; partopreno en decidigaj kulturaj kolokvoj ne okazis. Ĉu tiu situacio povos pli longe daŭri ?

A.- **Ĉu ni timas la progreson ?** Ĉiu agema esperantisto troviĝas antaŭ la sama problemoj. Laboro abundas, kontakt-petoj multiĝas, kunlaboron proponas larĝaj rondoj. Responde, kion ni faras ? **Ni evitas tiun laboron** pro ties abundeco ; **ni evitas kontaktojn**, ĉar ili devus okazi dum la horoj de la propra profesia okupo ; **ni evitas kunlaborantojn**, ĉar ili nin kondukus pli foren, ol ni povas akcepti. Fakte ni timas la progreson, ĉar ni ne estas organizitaj por ĝin akcepti.

Cl.- **Ĝenerala malkontentiĝo** : La rezulto estas ĝenerala malkontentiĝo. Ĉiuj sentas, ke esperanto povus rapide progresi, sed ke fakte tio ne okazas. Kelkaj pensas, ke la lingvo mem kulpas pri tiu stagno. Aliaj kulpigas la gvidantojn de la esperantistaj societoj. Kiuj analizis la situacion, tiuj alvenis al la konkludo, ke nia organizo ne plu respondas al la hodiaŭaj bezonoj kaj cirkonstancoj.

A.- **Niaj societoj devas plenumi taskojn, kiuj superas iliajn labor-fortojn** : La malmulto, kiun ni faras por esperanto, pli kaj pli forrabas nian tempon malprofite al la profesia perfektigo. Pro tio la plej kapablaj esperantistoj tendencas forlasi sian esperantan okupon. Aliaj troviĝas antaŭ peniga decido : ĉu esperanto aŭ ĉu la profesia perfektigo ? Ni troviĝas en krizo. Niaj societoj, grupoj, kluboj, asocioj troviĝas en malfacila situacio, ĉar ili devus plenumi taskojn, kiuj superas iliajn labor-fortojn. Alvenis la momento por la svisa esperantistaro sin doni labor-kapablan institucion kun konstanta sekretario.

Cl.- **Ni estas sufiĉe fortaj por starigi tiun institucion** : Ni bone ekkonsciu, ke la hodiaŭa krizo estas grandparte la rezulto de nia kresko. La danĝero estas lasi tiun situacion eterniĝi. Kontraŭe, se ni unuigas niajn fortojn, ni povos solvi niajn problemojn. Ni estas sufiĉe fortaj por starigi tiun institucion, kiu hodiaŭ mankas al ni. Per tiu institucio ni devas oficialigi en la publika vivo la ekziston de esperanto kaj de ties organizaĵoj kaj kulturo. Tiu institucio devas federi la laborfortojn de la esperantistaj societoj profite al la tutsvisa kultura vivo.

A.- **Renkontiĝejo, altlernejo, sindikato** : Tiu institucio devos ludi la rolon de renkontiĝejo, kie la esperantistoj ekkonscios pri sia forto. Tiu institucio devos ludi la rolon de altlernejo, kiu alportas sian kunlaboron al la grupoj por la elementa instruado kaj kiu organizas perfektigajn

Alvoko al la svisa esperantistaro por la kreo de Kultura Centro Esperantista
Claude Gacond, 308-a radioprelego, 1969.09.03 & 06

kursojn. Tiu institucio devos ludi la rolon de sindikato, kiu konstante defendas la rajtojn de la esperantistoj antaŭ la publikaj instancoj.

Cl.- Kultura Centro Esperantista : Je la zamenhofa tago 15-a de decembro 1968, post alvoko de la Centra komitato de la Esperanto-edukistaro de Svislando, grupiĝis en Biel-Bienne 14 reprezentantoj de diversaj svisaj esperantistaj societoj. Post detala kaj profunda debato pri la hodiaŭa krizo, ili unuanime akceptis la principon mem de la kreo de nova institucio. Tiel naskiĝis, sub la nomo **Kultura Centro Esperantista**, institucio, kiun ni volas hodiaŭ prezenti al vi.

A.- Celoj de la Kultura Centro Esperantista : En la statuto de la Kultura Centro Esperantista, artikolo jene difinas la celojn :

Cl.- organizi kursojn, seminariojn, kolokvojn, kulturajn manifestaciojn ;

A.- reprezenti esperanton en plej diversaj kulturaj medioj ;

Cl.- rilati kun instru-instancoj kaj Unesko ;

A.- helpi la esperantistajn societojn, kiuj deziras altigi sian kulturen nivelon ;

Cl.- fondi esperantistajn societojn en la urboj, kie ne ankoraŭ ekzistas esperantista vivo ;

A.- peradi por la internaciaj esperantistaj societoj, kiuj ne ankoraŭ havas sekciojn aŭ delegaciojn en Svislando.

Cl.- favorigi kontaktojn inter la svisaj esperantistaj societoj mem kaj inter la esperantistaj kaj ne-esperantistaj societoj por diskonigi la esperantan kulturon.

A.- Por ke tiuj celoj ne restu belaj intencoj sur papera folio, estis decidite malfermi konstantan sekretariojn. Aŭtomate ni troviĝas antaŭ kompleksaj problemoj tute novaj por la esperanta movado en Svislando...

Cl.- La tempo ne permesas al ni legi pli longe tiun alvokon.

A.- Se vi deziras ĝin ricevi, petu ĝin skribante al Radio-Svislando.

Cl.- Vi aŭdis parton de alvoko al la svisa esperantistaro. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-